Jarkolekto : 2004 | Numero : 4 | Pagxo : 1

# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri Senlime kaj esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

BELGIO NEDERLANDO GERMANIO E

Senlime

Esperanto-Asocio en Euxregiono Mozo-Rejno

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters,
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. Xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

---

Informilo aperanta kvarfoje en jaro.

**Jara abono / aligxo : 10 EUR**

**Belgio** : konto 000-0245571-64
IBAN: BE29 0000 2455 7164
BIC: BPOTBEB
Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,
BE-4800 VERVIERS

**Nederlando** :
ni bedauxrinde devas peti vin ke vi provizore bonvolu uzi alian konton.

**Germanio** : konto 6623201,
Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)
Im Pesch 20
DE-52134 HERZOGENRATH

Kotizoj do principe pagendas dum la novjara periodo (decembro aux januaro). La kotizintaj membroj principe gxuas rabaton okaze de aligxo al Trilanda Renkontigxo organizita de ***Senlime***.

# Trilanda renkontigxo

## *Senlime*

invitas vin al

## Trilanda Renkontigxo en Stavelot-a Abatejo

Dimancxon, la 22an de majo 2005 (dato konfirmota).

## Programo :

09h30 Malfermo de la akceptejo (en la muzea trinkejo).
10h00 Akcepto per bonveniga kafo.
10h30 Vizito de la muzeo pri la Princlando Malmedy-Stavelot.
12h30 Tagmangxo (provizora menuo–trinkajxoj ne enkalkulitaj) : legoma kremajxo-meleagrina rostajxo-cxokolada muso.
14h00 Vizito de la muzeo pri la auxto-vetkurejo Francorchamps.
15h00 Laux via placxo : gvidita promenado tra Stavelot aux vizito de la muzeo pri Vilhelm Apollinaire (Apoliner).
16h00 Mangxeto (1 torta peco + 1 kafo) kaj disigxo.

**Prezo : 25 EUR** – trinkajxoj neenkalkulitaj krom akcepta kaj fina kafo.
Kutima rabato da 20 % nur por
- kotizintaj (post 2004/06/30) membroj de ***Senlime***
- infanoj kaj junuloj < 26 jaragxaj.

### *Bonvenon al cxiuj !*

Sed… atente legu la detalojn interne :
- Deviga rezervado kaj pago **antaux la 8an de majo 2005.**
- Grupa prezo postulas saman programon (mangxo,…) por cxiuj.
- Auxdvidaj muzeoj vizitendaj per kapauxskultila gvidado en la lingvoj FR-NL-DE kaj EN (tradukado al esperanto neebla).
- La muzeaj vizitoj eblas por rulsegxantoj.
- Akompanaj bestoj estas malpermesataj.

***Restauxrigado respektema pri la spirito de la lokoj transformis la iaman***

# *Abatejon Stavelot-an*

***en turismejon indan je ties rango : historio, religio, pentrarto, muziko, teatro, poezio kaj motor-sportoj cxeestas inter gxiaj privilegiaj gastoj…***

**Stavelot**

De la strato, la vizitanto rondvidas la redesegnitajn cxirkauxajxojn de la abatejo kaj la arkeologiajn postrestajxojn de la abateja pregxejo. La plialtigo de la masonajxoj kaj la rekonstruado de la kolonaj bazoj ebligas ilian pli bonan legadon. Ilia malkovro konsistigas naturan inviton al la vizito de la abatejo.

La restauxrigado de la klostro, ege ampleksa verko, plenumas cxiujn gxiajn promesojn. Komplete vitrita koridoro okupas la nordan alon, kiu estis komplete malaperinta. La aliaj alojn de la kvarangulo tiel restarigita kaj la gxardeno travide kontempleblas.

Okupanta pli ol la duono de tiu spaco kaj multnombrajn renovigitajn flankajn salonegojn, la nova muzeo dedicxita al la historio pri la abateja episkopejo en Stavelot-Malmedy estas eksterordinara, tiom pro gxia koncepto ol pro gxia realigado, neelturnigxebla.

Krom la muzeo pri la vetkurejo en Spa-Francorchamps kaj la muzeo pri Apollinaire, kiuj profitas el vere atraktoplena surscenigado, novaj funkcioj estas disigitaj en la kvar etagxoj : seminariaj salonegoj, trinkejo, muzea vendejo, publika biblioteko, kaj kultura centro; la portempaj ekspozicioj trovos lokon en la tegmenta armaturo, sub impona trabaro.

Fine, la teatraj kaj muzikaj aktivajxoj kiuj konsistigis la reputacion de Stavelot disvolvigxos en tute restauxrigitaj salonegoj, kiel la mangxejo kaj gxiaj rimarkindaj stukoj el la 18a jarcento.

**Nova interpreta Centro**

La scenografio rakontanta la historion pri la iama eklezia sxtato estas vida cxefverko ; gxia harmonia integrado en tiun prestigxan atestilon pri la arto de la tiuepokaj konstruistoj admirendas. Gxi dividigxas en naux kronologiajn prezentojn, dum lauxtema analizo insistas pri tri aspektoj ligitaj al la vivo de eklezia sxtato : la spiriteco, la artoj, la politiko kaj gxia korolario, la ekonomio.



La klostraj koridoroj estas enmergitaj en relativan duonombron revivigante la monakan etoson kiu iam superis en tiuj lokoj. Cxiuj multmediaj rimedoj estas sagxe ekspluatitaj : tridimensiaj rekonstruoj, virtualaj imagoj (nepre videndas la « Stavelota biblio »), televidaj spacoj, projekciaj salonoj (la juvelartaj trezoroj de la abatejo estas honorigitaj). Artefaktoj, artajxoj, historiaj dokumentoj, liturgiaj objektoj, statuoj, planoj. Lauxtparoliloj deklamas la regularon laux sankta Benedikto aux disauxdigas monakajn kantojn. Auxdvidaj raportoj precizigas ke la abatejo posedis sian propran armeon kaj sian propran justicon. La fotajxoj pri la juvelajxoj disigitaj en la tuta mondo atestas ke iliaj auxtoroj figuris inter la plej lertaj siatempaj cxizistoj.

**Muzeo Apollinaire**

Referenca loko dedicxita al la poeto kaj al lia verkaro, tiu muzeo enhavas kvindek portretojn akompanitajn per komentarioj, biblioteko kaj dokumentejo; liaj plej belaj poemoj, inter kiuj kelkaj legitaj de Apoliner mem, estas auxskulteblaj.

**Muzeo pri la kurejo**

En la keloj de la abatejo, la muzeo malkasxas cxiujn sekretojn pri la plej bela auxtomobila vetkurejo el la mondo per alproksimigxo homa, teknologia, geografia, ekonomia kaj sporta.

La salonego por Kontemplado, kun gxiaj eksterordinaraj volboj, profitas el propra dezajno [design].

La prezentataj vetveturiloj konis sian glorhoron en Francorchamps; ili precipe signis ties plej belajn pagxojn.

Novaj spacoj estas dedicxitaj al la historio de la kurejo (video-bendoj projekciataj sur grandaj ekranoj, afisxegoj kaj lumbildoj).

Flankaj salonegoj omagxas al la « homoj en la ombro » kiuj partoprenas por la bona disvolvo de la vetkuroj.

Skizajxo elvokas gxian fizikan cxirkauxajxon, la regadon de la veturaj fluoj cxirkaux la kurejo kaj gxiaj sekuraj aspektoj.

Aliaj veturiloj kaj tempaj ekspozicioj konstante renovigos la intereson de la vizito.

Laux Belgia « ***Touring Club*** »

# ESPERANTO✪

## Euxregiona kalendaro 2004 (3 + 4)

***Senlime*** publikigas kalendaron pri la esperanto-arangxoj en la Euxregiono Mozo-Rejno.
Gxi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontigxoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aux esperanto-grupo en Euxregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj auxtune), lauxvice en cxiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-cxi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aux aktivajxojn organizitajn aux subtenitajn de komitatanoj. Gxi neniel igxu kompleta kalendaro de esperanto-arangxoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** principe okazas cxiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, cxiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

| | |
|---|---|
| **07-16** Somera pauxzo. | **07-16** Pause d'été. |
| **08-20** Somera pauxzo. | **08-20** Pause d'été. |
| **09-17** 19h30 BE-Kelmis Select: "Tabuaj vortoj en esperanto" : prezento de libro far' Marcel **Delforge** kaj grupa debato pri tiu temo. | **09-17** 19h30 BE-Kelmis Select: "Mots tabous en espéranto" : presentation du libre par Marcel **Delforge** et débat de groupe sur ce thème. |
| **10-10** 9h30 BE-Blegny-Minejo: (Liegxo), Trilanda renkontigxo. | **10-10** 9h30 BE-Blegny-Mine: (Liège), Rencontre des (espérantistes des) Trois Pays (BE-DE-NL). |
| **10-15** Pauxzo (pro la Tl.R. ni escepte **NE** kunvenos en Kelmis). | **10-15** Pause (suite à la Tl.R., exceptionnellement, nous **NE** nous réunirons **PAS** à La Calamine. |
| **11-19** 19h30 BE-Kelmis, Select: Klaus **Hogen** revigos nin per **"Kasteloj"**. | **11-19** 19h30 BE-Kelmis, Select: Klaus **Hogen** nous fera rêver avec des **"Châteaux"**. |
| **12/12** 11h30 BE-Kelmis, Select: tradicia Zamenhof-festo. | **12/12** 11h30 BE-Kelmis, Select: traditionnelle fête Zamenhof. . |
| ✪ | ✪ |
| Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos en 2005, je la 19h30, la: **01-21, 02-18, 03-18, 04-15** kaj **06-17.** | Autres réunions à BE-Kelmis, au Select, en 2005, à 19h30, les: **01-21, 02-18, 03-18, 04-15** et **06-17.** |



Nepre partoprenu nian majan trilandan renkontigxon en

# STAVELOTa-ABATEjo

Atente legu cxi-sube cxiujn utilajn informojn.

**Pri la intereso kaj prezo**

Cxiam trovigxas inter esperantistoj iuj, kiuj opinias ke la postulita prezo estas tro alta, aux ke la arangxo ne estas suficxe «esperantista».

Kial mi partoprenus tian aferon, se mi povos mem, samkoste aux ecx pli malmultekoste, fari tion per miaj propraj rimedoj kaj mia propra lingvo… ?

Fakte, bonvolu memori ke jam de pli ol dek jaroj, multaj spertas « psikologian » sojlon kaj opinias ke pli ol 1000 BEF (25 EUR) por unutaga arangxo estas tro.

Tamen cxiuj devas konsscii ke, dum dek jaroj ekzemple, la prezoj suficxe kreskas. Estas certe ke tio, kio kostis 25 EUR en 1994, nun kostas 30 EUR aux pli. Ankaux esperantistoj ne povas fari miraklojn !

**VIAJ AVANTAGxOJ ?**

Okaze de nia "trilanda renkontigxo" profitu el esceptaj eblecoj :
- rabatita prezo (grupa)
- gvidita vizito de Stavelot en esperanto
- cxeesto de multaj esperantistoj diversnaciaj (komuna tagmangxo,...)
- dokumentoj kaj helpo en esperanto, ...

N-B : ne eblas prizorgi la kapauxskultilan gvidadon (nepran por plene gxui pri la vizito) en esperanto. Pro tio – felicxe kaj kompense - profitdona partopreno de ne-esperantistaj akompanantoj tute eblas.


Jen niaopinie kelkaj bonaj kialoj por nepre pasigi tiun tagon kune !

Jam hodiaux sendu vian aligxilon kaj vian kontribuon…

Do :

***Koran inviton al cxiuj, esperantistoj aux ne !***

**Situo**




**Aliro**

**El Nederlando, Liegxo aux Germanio**

Auxtovojo E40 Liège poste E42 direkte al Verviers-Prüm, elirejo 11 (Malmedy) poste sekvu la direkton al Stavelot.

**El Luxemburgo**

Auxtovojo E25 elirejo 48 Werbomont, elirejo 49 Manhay, poste sekvu la direkton al Stavelot (atentu : nuntempe gravaj laboroj cxe tiu auxtovojo).

**Per trajno, el Liegxo (informigxu cxe TEC kaj SNCB pri eventualaj horar-sxangxoj)**

Liège-Guillemins : foriro je la 9h16 al Luxembourg.
Alveno en stacidomo Trois-Ponts (apud Stavelot) je la 10h10.
Foriro per la TEC-buso n°45a je la 10h30 al Manderfeld (Stavelot je 10h38).

**Informoj (FR-NL-DE-EN) :** http://www.abbayedestavelot.be

**Espaces Tourisme & Culture** BP 52 - BE-4970 Stavelot
Telefono : +32 (0) 80/88.08.78
Telekopioj : +32 (0) 80/88.08.77
Malfermas cxiutage de la 10h gxis la 18a h. Fermita lunde.

# INVITO

## Senlime

invitas vin al sia tradicia Zamenhof-festo

**Kiel aliaj esperantistaj grupoj, ni ĉiujare festas la datrevenon de naskiĝo de Zamenhof.**

**Sed multaj forgesas, ke tiu tago estis elektita kiel tago de literaturo kaj libro en esperanto.**

***Senlime* volas festi okaze de la fino de sia kultura sezono, per komuna amuziĝo kaj (ununura fojo ne estas kutimo) manĝado...**

**Kie ? Kulturdomo – trinkejo *"Select"***
264 Lütticher Strasse,
BE-4720 KELMIS

**Temo ? Kulturo kaj esperanto**

**Kiam ? Dimanĉon, la 12-an de decembro**
***(dato konfirmota kaj menuo decidota)***
ek de la 11h30 (ne pli frue !).

**Programo ?**
**Interkonatiĝa aperitivo**
Tagmanĝo
**Kulturaj eroj.**

***Atentu : deviga antaux-aligxo***

**Kiom da vizitoj por nia ttt-ejo dum kvar lastaj monatoj ?**

| | | |
|---|---|---|
| Belgio | 1097 | 65,41% |
| Francio | 184 | 10,97% |
| Nederlando | 82 | 4,89% |
| Usono | 70 | 4,17% |
| Germanio | 56 | 3,34% |
| Anglujo | 31 | 1,85% |
| Hispanio | 18 | 1,07% |
| Kanado | 16 | 0,95% |
| Luksemburgio | 16 | 0,95% |
| Pollando | 11 | 0,66% |
| Nekonataj aux aliaj landoj | 96 | 5,72% |
| SUME | 1667 | 100,00% |

*Statistikoj : NEDSTATBASIC*

## Vizitu la ttt-ejon de *Senlime !*

Grandparte en kvin lingvoj : esperanto, franca, germana, nederlanda, angla.

- Senlime
  - Eo-Grupo Verviers
- Babel
- Senpaga kurso
- "Scolaweb"
  - F.H.S. 0rlando
  - Lernejo Tibor Sekelj
  - Homaranismo
  - Sofrologio
  - Nia kursaro
- Turismo
  - Vojo de l'kasteloj
  - Blegny-Karbminejo
  - Botrange
  - Comblain-au-Pont
  - Jalhay-Gileppe
  - Liegxo
  - Reinhardstein
  - Remouchamps
  - Theux-Franchimont
  - Verviers
- Kluba agendo
  - Vesper-kunvenoj
  - Trilandaj renkont.
  - Zamenhof-festo
- Informilaro
  - Blog (fresxaj artikoloj, informojn, leteroj,…)
  - Vocho de Amikejo (tiu-cxi papera informilo)
  - Dissendo-listo (ret-informilo)
  - Forumo (leter-intersxangxo malfermita al cxiuj)
  - Komitato (nomoj, fotoj, … de la komitatanoj)
- Babilejo
- Ora libro (enmetu vian opinion pri la ttt-ejo !)
- Ligiloj al multaj aliaj interesaj ttt-ejoj.

Adreso : « **http://www.*senlime*.org** »

**V**erviersa **A**ngulo

**V**erviersa **E**speranto **G**rupo

# Onze siècles d'histoire pour la Principauté de Malmedy-Stavelot

## Dek-unu jarcentoj da historio por la Princlando

**Comité de V.E.G.**:

Président: J. Jacob
18 Petit Jonckeu
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: R. Demarche
22 Rue Donckier
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.68.18

Secrétaire: J.-M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte
n°: 000-0245571-64
IBAN: BE29 0000 2455 7164
BIC: BPOTBEB1
de:
Esperanto Grupo
22 Rue Donckier
BE-4800 VERVIERS

*La cotisation de Senlime est restée inchangée depuis sa création, il y a 11 ans.*

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 03-04 12 €
U.E.A. 2004 54 €
Senlime 2004 10 €

en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire et l'année: *«cotisation de …. pour ….».*

---

**Site internet**
http://www.senlime.org

Distancigxantaj je sep kilometroj kaj duono, la abatejoj en Stavelot kaj Malmedy naskis princepiskopejon kiu disponis pri sxtata suvereneco dum dek-unu jarcentoj. La spirituala povo estis dividita inter la episkopejo en Kolonjo por Malmedy, kaj Liegxo por Stavelot. Konkure vivanta sub la episkopa bastono de ununura abato-princo, cxiu abatejo trairis propran vivon, gvide de prioro. Tiu dueco dauxris dum jarcentoj preskaux sen tro da sxokoj, Stavelot tamen profitante el certa superrangeco.
Gxia historio variis inter periodoj da plenkresko kaj da dekadenco, ligitaj al la personeco de la sepdek abatoj mem kiuj sin sekvis.
Kvar el ili notinde stampis la historion de la princepiskopejo: sankta Remaklo, la fondinto; sankta Poppon (978-1048), granda konstruanto; Wibald (1098-1158) politika homo kaj mecenato ligita al la kreado de esceptaj orajxartaj pecoj; Guillaume de Manderscheidt, kiu redonis al la princepiskopejo gxian tutan brilon dum sia regno (1499-1546).

Remaklo, Benediktana monako naskigxinta en 612 en Aquitaine, estis komisiita de la merovida regxo Sigebert la 3a evangelizi niajn regionojn. Li starigis monakejon borde de la rivero Warchenne en 648 kaj baptis la lokon « Malmundarium » (loko purigita de la malbono).
Alvokita por segxi en Liegxo kiel princ-episkopo en 65O, « La Apostolo de l'Ardenoj » starigis la saman jaron alian monakejon borde de la rivero Amblève, sur teroj apartenantaj al sia nova diocezo kaj kiun li nomis « Stabulum » (stalo).
Kerne de komunikada reto kuniganta la tiuepokajn urbajn centrojn (Liegxo, Kolonjo, Trevo, Akeno, Arlono, ...), la princlando rapide gxuas pri rimarkindaj politika, religia kaj kultura ekflorigxo. Multnombraj donoj konsiderinde kreskigis gxian biendevenan havajxon (pregxejetoj, bierfarejoj, vinberejoj, fisxkaptejoj, ...).
Unua pregxejeto dedicxita al la sanktuloj Marteno, Petro kaj Pauxlo estis starigita meze de la senluksaj monakaj cxeloj. Merovida pregxejo poste estis konsekrita flanke de tiu unua sanktejo la 25an de junio 685. Oni tien metis la restajxon de la sankta fondinto (forpasinta inter 669 kaj 679), konservitajn en relikvujo el oro kaj argxento.

Dum la karolida epoko (687-855), la tempo dedicxita al la artoj kaj beletro kreskis: monaka pregxejo malfermigxis al la laikoj kaj le monakoj tiam povis instrui la religiajn fakojn.
Post la ruinigoj kauxzitaj de normandoj en 881 kaj 883, la abatejo estis malruinigita kaj pligrandigita. La monaka vivo denove karakterizigxis per religia asketismodedicxita al disciplino kaj studado.

Impulse de Poppon la 1a, la princlando igxis luma kovejo por artoj kaj sciencoj. Li konsekris abatan pregxejon romanikan pli ol 100 m longa la 5an de junio 1040.

Antaux la surtronigxo de Guillaume de Manderscheidt, en la 16a jarcento, la princlando estis suferinta pro longa periodo da ekkadukigxo: intestaj kvereloj, monakaj konstruajxoj difektitaj, financoj malbone regitaj, malrigorigxo de la disciplino, perdo de bienoj kaj kasteloj. Li rehavigis al gxi la perditajn teritoriojn, restauxrigis la abatejon, rekonstruis gravan parton de la abateja pregxejo laux gotika stilo kaj konstruigis la eniran turon kiu, en 1534, altis je 100 m ! Gxi estis kronigita per gotika pinto.

De la fino de la 16a jarcento gxis la franca revolucio, la lando trovigxis kerne de la konfliktoj inter la najbaraj potencoj, provokantaj rabadojn, detruojn kaj ruinigojn. En 1701, la sonorilturo kaj la tegmento de la pregxejo estis detruitaj pro incendio. La konstruado de dormejoj en 1741 kaj aliaj monakaj konstruajxoj konsistigis efemeran plibeligon antaux la revoluciaj konfuzoj kiuj mortsonoradis por la privilegioj donitaj al la nobelaro kaj al la klerikaro.
Dum la Liegxa revolucio (16an de auxgusto 1789), le princ-abato cedis al la postuloj de la popolo sed devis forfugxi en 1792. Du jaroj poste, aliaj religiuloj ekziligxis, forportante sur 18 cxaretoj la arkivojn kaj la plej altvaloran juvelojn de la abatejo.
Kelkaj monakoj restis surloke por konstati, senpovaj, la transformigon de sia kultejo en hospitalon por venereaj soldatoj. Kondutantaj kiel vandaloj (bruligitaj lignajxoj, detruitiaj altaroj, orgenoj eltiritaj), ili ruinigis la religian konstruajxon de fundamento gxis tegmento.
La ejo estis vendita la 29an de auxgusto 1798 al privatuloj. Ili malkonstruis la abatejan pregxejon, krom la malsupra parto de la enirturo. La konstruajxoj poste konis diversajn afektoj: hospitalo, orfejo, tanejoj, hangaroj, urbaj oficejoj, ... kaj urbo-domo.

| # INVITO | **Senlime**<br>invitas vin al sia Zamenhof-festo |
|---|---|
| Kiel aliaj esperantistaj grupoj, ni ĉiujare festas la datrevenon de naskiĝo de Zamenhof.<br><br>Sed multaj forgesas, ke tiu tago estis elektita kiel tago de literaturo kaj libro en esperanto.<br><br>Ĉi-jare, ni klopodos iomete plilarĝigi la temojn de niaj kulturaj eroj al ludo, radio, televido, muziko, kino, teatro, k.t.p. en esperanto.<br><br>**Prenu vian kalkulilon pro matematika ludo!** | **Kie ? Kulturdomo – trinkejo *"Select"***<br>264 Lütticher Strasse,<br>BE-4720 KELMIS<br><br>**Temo ? Kulturo kaj esperanto**<br>**Kiam ? Dimancxon, la 12-an de decembro** ek de **12h00** (malfermo de la domo nur post 11h30 precize !).<br><br>**Programo ?**<br>Interkonatiĝa aperitivo<br>**Tagmanĝo**<br>Kulturaj eroj.<br>***Bonvenon al ĉiuj (antaŭa aliĝo deviga)*** |

✂-----------------------------------------------------------------------------------------------

# Aliĝilo: Zamenhof-festo

Ĉiu partoprenonto nepre kompletigu apartan aliĝilon (aŭ fotokopion) kaj alvenigu ĝin plej malfrue la 4-an de dec. 2004 al S-ro R. DEMARCHE
22 rue Donckier
BE - 4800 VERVIERS.

S-ro/S-ino/F-ino: ______________________
familia nomo (por alfabeta ordigo)

Naskiĝdato: ___ ___ ___ ______________________
jaro monato tago antaŭnomo aŭ persona nomo

Adreso: ______________________
strato kaj numero

___ _________ ______________________
landa kaj urba kodoj urbo

______________ ______________
tel. n-ro (kun zona prefikso) faks. n-ro (kun zona prefikso).

______________________
ret-adreso

*Daŭrigo dorsflanke...*

# MENUO

Tomata supo kremaspekta

–

Ovopatkuko laŭ kampara maniero

–

Porkaĵo laŭ kurĉasa maniero
aŭ
Fileo de fiŝo (tilapio) en nederlanda saŭco,

boligitaj aŭ frititaj terpomoj,

legomoj

–

Fruktomiksaĵo.

✂-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

- legis, komprenis kaj aprobas la aliĝkondiĉojn,
- aliĝas al la Zamenhof-festo de ***Senlime*** la 12-an de decembro 2004 en Kelmis,
- **mendas** varman tagmanĝon je la prezo da **19 EUR.**
- **elektas** porkaĵon – fileon de tilapio (forstreku la nevalidan)
- **antaŭe pagos tiun sumon al la konto de Senlime-Verviers :**

**000-0245571-64** (Por internacia pago : IBAN: BE29 0000 2455 7164, BIC: BPOTBEB)
ESPERANTO GRUPO
22 RUE DONCKIER
BE - 4800 VERVIERS

Nur eksterlandaj aliĝintoj[1], se necese (pro translima pagproblemo) rajtas surloke pagi sed ***Senlime*** nepre fakturos la mendita(j)n manĝo(j)n kaze de ne-partopreno

*Tiukaze la mendinto/subskribinto persone responsas pri la surloka pago (per EŬRoj) de sia mendo (nenial surloke uzu ĉekojn, ĝirilojn, iamajn aŭ ekster-eŭropajn monerojn, k.t.p. !).*

Dato: Subskribo:

|_|_| |_|_| |_|_|
jaro monato tago

[1] Nur tiu kiu ĝustatempe alvenigis la aliĝilon al S-ro Demarche estas aliĝinto !

# Aligxilo al Trilanda Renkontigxo Stavelot 2005/05/22

Cxiu aligxanto nepre kompletigu apartan dokumenton (au x fotokopion) kaj alvenigu gxin antaux la 8an de septembro cxe Jean-Marie **Jacques**, 5 rue Wauters, BE-4800 VERVIERS, ☎ (xx-0)**87/33.02.92**.
Forstreku la nevalidajn menciojn kaj krucumu la elektitajn alternativojn.

S-ro/S-ino/F-ino: ______________________
familia nomo (por alfabeta ordigo)

Naskigxdato: ____ ____ ____ ______________________
jaro monato tago antauxnomo aux persona nomo

Adreso: ______________________
strato kaj numero

____ ________ ______________________
landa / urba kodoj urbo

______________ ______________
tel. n-ro (kun zona prefikso) faks. n-ro (kun zona prefikso).

e-adreso : ________________ @ ________________

- legis, komprenis kaj aprobas la invit-kondicxojn(1) de ***Senlime***,
- aligxas al la **Trilanda Renkontigxo** en Stavelot-a abatejo, la 22an de majo 2005 kaj do **hodiaux** antauxpagas la devigan kaj nerepageblan aligx-kotizon da :

25,00 EUR 20 EUR pro rabato (20 %)

Al la konto 000-0245571-64 de Esperanto-Grupo, rue Donckier 22, 4800 VERVIERS
IBAN: BE29 0000 2455 7164 BIC: BPOTBEB1

Al la konto de ***Senlime***: 6623201, Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000).

**Rabaton** da 20% (5 EUR) gxuas **NUR** junuloj (<26 j.) kaj (**post** la 30a de junio 2004) kotizintaj membroj de "***Senlime***".

- deziras ricevi vian trimonatan informilon «***Senlime***»:
  - per ordinara **pos**xta sendo, surpapere (membrigxo tiam deviga)
  - ene de la revuo de **APE**/Liege-Esperanto («Inter ni», kiun mi abonas)
  - per legado/telesxargo el la **ret**aj pagxoj de ***Senlime*** (http://www.senlime.org)
  - per mia propra sistemo («***Senlime***» **NE** estu sendita al mi persone).

N-B: estas notinde, ke ***Senlime*** mem ne praktikas grupajn sendajxojn aux similajn sistemojn.

Dato: ____ ____ ____ Subskribo:
jaro monato tago

***(1)*** La aligx-kondicxoj estas detale priskribitaj en la n-ro 2004-4 de la informilo de ***Senlime***